iris al la flughaveno Haneda. Ni bedaŭris ke, pro manko de tempo, ni ne povis viziti ankaŭ Hiroŝimon kaj Hokkajdon, sed certe ni revenos al tiu fascina lando por vidi ankaŭ aliajn el ĝiaj facetoj, ekzemple kiel ĝi strebas esti la dua plej forta ekonomio en la mondo aŭ kiel 95 delegitoj de UEA dediĉas sin por okupi la kvaran lokon inter la delegitaroj de UEA. Mi tre ŝatus konatiĝi kun aliaj japanaj esperantistoj. Tamen, eĉ tiu mallonga vizito montris al mia scivolemo kulturen kaj topografian similecon transmarajn kaj refojan agnoskon ke malgraŭ niaj diferencoj lingva, historia kaj politika, ni homoj, kaj specife esperantistoj, esence ne malsamas kaj ni ĉiuj strebas al ĉiutaga feliĉo kaj klopodas feliĉigi aliajn. Pro afablaj novaj amikoj, ni sentis nin en Japanio kvazaŭ hejme, kaj niaj ses tagoj tie estis amuzaj, inspiraj, komfortaj kaj vere memorindaj. Koran dankon al ĉiuj, kiuj helpis!

KIM Wongill (Laguna Hills CA)

Letere

Dorothy Holland skribis en *Esperanto USA* 3/1999, p. 12: "Pastro Andreo Cseh uzis ĉi tiun [metodon] antaŭ cent jaroj ĉe Eŭropa koncentrejo kie oni parolis multajn lingvojn."

Mi bonvolas kompreni, ke el Usono, la eŭropa historio aspektas komplika kun tiom da militoj. Sed kiam oni raportas pri historiaj faktoj, ĝenerale oni referencas al fidindaj fontoj. Pri Cseh, ili ekzistas en la *Memorlibro omaĝe al Andreo Cseh* de Katalin Smidéliusz (1995).

Honore al la reputacio de ELNA, ankaŭ de la Amerika Asocio de Instruistoj-Esperantistoj, vi devas nepre en venonta numero korrekti la "enormajn" erarojn.

Andreo Cseh naskiĝis en 1895, do ne povis antaŭ cent jaroj (1899) jam ekinstrui la lingvon.

La duan mondmiliton (1939-1945) – la militon dum kiu nazioj kreis koncentrejojn – Andreo Cseh travivis en Nederlando, kie li definitive ekloĝis en 1930. Sian faman metodon li kreis en 1920 en Sibiu (Transilvanio), tiam sub regado de aŭstro-hungaroj, nun en Rumanio. Sur la domo de la iama biblioteko kie li instruis videblas memortabulo.

Louise MARIN (Paris FR)

Ĉu vi studas retpoŝte?

Dum la tuta historio de la Internacia Lingvo, inter la ĉefaj malhelpoj al la kreskigado de la lingvuzantaro estas: (1) manko de parolkomunumo tie, kie iu ekinteresiĝas pri la afero; (2) manko de lerneblecoj (ne ĉiu sukcese povas aŭto-didaktumi); kaj (3) manko de eblecoj tuj ekuzi la lingvon.

Sed dum la lastaj jaroj, unu el la plej signifaj fenomenoj en Esperantujo estas la disvolviĝo de la lingvo en Internet. En preskaŭ ĉiu kongreso en Usono estas nun programero pri la lastaj tehnikaj plibonigoj por faciligi la lernadon kaj uzadon de Esperanto. Ofte oni mencias, ke ekzistas retroŝtaj kursoj, sed multaj homoj konstatas la vastecon de tiu laboro.

La konatan 10-lecionan poŝtan kurson oni adaptis por enreta uzado kaj tradukis en plurajn lingvojn. Nun per tia kurso eblas studi retroŝte en la angla, ĉina, finna, franca, germana, hispana, itala, portugala kaj rusa lingvoj. Sed kiom da personoj kunlaboras por gvidi la studentojn, kaj kiom da studentoj estas? La respondo de la kursadministrantoj: ne-sufiĉe, kaj multe pli ol eblas priservi.

Marko Rauhamaa, administranto de la anglalingva kurso, informas, ke aktuale 31 instruantoj gvidas 100 studentojn, kaj estas virtuala vico da homoj atendantaj liberan lokon en la kurso. La kurson en la portugala lingvo estras Jozefo Lunazzi, kiu rivelis eĉ pli imponajn ciferojn. Nuntempe 40 instruantoj gvidas 290 lernantojn. El tiuj, kiuj finas lecionon 1 de la kursoj, inter kvarono kaj triono finas la tutan kurson.

Post iom da enkapo matematiko, oni konstatas, ke el tiuj kursoj venas konstanta fluo da freŝbakitaj esperantistoj. Ili loĝas diversloke, kaj ofte estas relative izolaj. Nu, kiel ili ekzercu sin kaj progresu en la lingvoscio? Denove en Internet. Ekzistas kelkaj "novajaroj" (en la angla *newsgroup*), sed la plej aktiva estas *soc.culture.esperanto* kie estas tre alta trafiko (ĉirkaŭ 100 mesaĝoj tage). Por "viva" kontakto, estas

Malgraŭ sia nomo, Esperanto-Ligo por Norda Ameriko estas la nacia Esperanto-organizo de Usono. La Esperanto-organizoj en najbaraj landoj estas kontaktablaj laŭ la indikitaj adresoj.

A pesar de su nombre, la Liga de Esperanto para Norteamérica es la organización nacional de Esperanto de Estados Unidos. La Federación Mexicana de Esperanto puede ser contactada en la siguiente dirección: Apartado Postal M-10576, México D.F. 06000

In spite of its name, Esperanto League for North America is the national Esperanto organization for the U.S. One can contact the Canadian Esperanto Association at the following address: PO Box 2159, Sidney BC V8L 3S6

Malgré son nom, la Ligue Espéranto pour l'Amérique du Nord est l'organisation espérantiste des Etats-Unis. Vous pouvez rejoindre la Société québécoise d'espéranto à l'adresse suivante: 6358-A rue de Bordeaux, Montréal PQ H2G

la kanalo #Esperanto en IRC (angle: *Internet Relay Chat*). Tio estas babilejo kie multaj homoj povas havi aktualan tajpitan konversacion. Estas pluraj radiostacioj kiuj dissendas Esperantlingve ankaŭ en Internet.

Por detalaj informoj pri la diversaj eblecoj ekspluati Esperanton en Internet, necesas nur foliumi iomete tra la Tut-Tera Teksaĵo (TTT = WWW = *World Wide Web*). Komencu ĉe la Virtuala Esperanto Biblioteko: <http://www.esperanto.net/v eb/>.

*
**

Are you a beginner? Can't get to one of the summer courses? No club in your town? If you have a computer and Internet access, you can learn (or improve) your Esperanto online. For information in English, point your browser to <http://www.esperanto.net/>, choose "English" and scroll down to "Learning". Even if you don't have a computer, you may be able to use one at your public library to take an e-mail course by using a Web-based e-mail service like Yahoo! Mail, or Hotmail. Ask your librarian.

Ĉarli GALVIN (San Francisco CA)



OPINIOJ


Marko RAUHAMAA (Thousand Oaks CA) afiŝis fine de aprilo ĉi-jare la jenan mesaĝon ĉe *soc.culture.esperanto*. Ni reaperigas ĝin sensanĝe kaj senkomente, kun permeso de la afiŝinto).

Esperanto-Ligo por Norda Ameriko sendis al ĉiuj siaj membroj leteron, kies lasta alineo komencas jene: "Within a few weeks, ELNA will launch its largest-ever direct-mail campaign, sending out letters to almost 5,000 teachers." (En de kelkaj semajnoj ELNA komencos sian ĝis nun plej grandan rektapoŝtan kampanjon. Ni sendos leteron al preskaŭ 5000 instruistoj.) Kiel ELNA akiris la adresojn de la instruistoj? Ĉu la instruistoj petis la leterojn? Jes, multegaj organizaĵoj kaj kompanioj sendas reklamojn perpoŝte. Jes, ĝi estas laŭleĝa (en Usono). Sed ĉu ĝi vere ĝojigos la ricevontojn? Ĉu ĝi estas morale aprobinda? Kial ne? Ĉar libera transmovado de datenoj pri homoj estas kontraŭ la privatecrajtoj de la homoj. Ĉar homoj jam ricevas sufiĉe da rubo per la poŝto. Ĉar ni devigos al homoj atenti pri nia reklamo. Oni nepre leĝe malpermesu rektan reklamadon, ĉu telefonan, ĉu poŝtan, ĉu retan. Aŭ ĉu mi tute miskomprenis la intencon de ELNA?

RECENZE

Durankulak, Sabira STÅHLBERG.
Varna: Bambu, 1998. 80p. 200x135.
Broŝurita. Kodo: DUR001. Prezo:
\$11.20

Durankulak estas transrealisma urbo, kiu kuŝas sur la stepo ie inter Moskvo kaj infinito. Ĝi ne estas multe vizitata – aŭtobuso alvenas tien unu fojon en la jaro – kaj la loĝantoj, homaj kaj hundaj, havas siajn sekretojn, kiujn ne konas la ekstera mondo.



Iun tagon alvenas la aŭtobuso kun unu persono haltonta en Durankulak: juna japano kun tornistro, fotilo kaj senfina provizo da filmbobenoj. Li havas apartan komision, kiun li povas plenumi nur en marĉo apud Durankulak. Sed antaŭ tio li devas akceptiĝi de la loĝantoj kaj – kun ni – lerni pri la sekretoj de Durankulak, ekzemple – ĉu la loĝantoj estas entute homaj.

La romaneto havas epizodecan karakteron; oni alternas inter priskriboj de la vivo en la urbo kaj la progreso de la japana ĉefrolanto al ties celo. Por mi, la du plej interesaj partoj estis tiu pri la lingvo de la durankulakaj hundoj (ĉu eble Sabira Ståhlberg volis diri ion al la esperantistoj?) kaj tiu pri la ribelo de la durankulakaj virinoj (ĉu temas pri ĉiujara rito, tamen, aŭ pri vera kaj daŭra revolucio?).

Mi dubas, ĉu efektive temas pri unu el la grandaj verkoj de la mondliteraturo. Ĝi tamen iel tiklas mian fantazieron, kaj mi ne dubas, ke mi revenos al ĝi post iom da tempo...

Don HARLOW
(Pinole CA)

Spite la vivon!, Miŝu Beraru. Berkeley:
Eldonejo Bero, 1998. 108p. 205x150.
Broŝurita. Kodo: SPI001. Prezo: \$8.30

Sepdek jarojn post la originala apero de tiu libro plenplena de spritaj versoj aperas la dua korektita eldono. En 1928 la 24-jara rumana aŭtoro aperigis sian unuan kaj nuran poezian libron. Li ankaŭ verkis Esperantan lernolibron kaj, kun kunlaboranto, dulingvan Esperantan vortaron, kaj multe instruis nian lingvon. Li mortis tragedie je la aĝo de 38.

La temoj pri kiuj Beraru poezias rilatas trafe al esperantistoj hodiaŭ. Li verkas pri naturo kaj amo, kaj nia lingvo kaj Esperantaj kongresoj kaj komunumoj. Li verkas amuze kaj satire, iam vortludante. Kaj ne mankas en tiu libro memironio.

Beraru estas bona rimfaranto. Li ne rimas ĉiam meĥanike sed ofte surprize kaj plezurdone. Ekzemple, li povas rimi “trankvil’ kaj” kun “silkaĵ kaj”, “danke” kun “homaran’, ke”.

Diversajn poemajn formojn li uzas. En la libro estas iuj sonetoj; ekzemple, “Tra Esperantujo” kaj “Konfeso”. La fina longa rakonta poemo estas “Tra la infero” en la stilo de *La dia komedio* de Danto. Tie Beraru uzas la saman trilionan stancon kiel la itala majstro sed por pli amuza kaj malpli altega celo.

Pro sia versiga kaj ridiga kapabloj Beraru memorigas iom pri Raymond Schwartz. Malantaŭ lia spriteco ŝvebas ia pesimisma sinteno. Tio kutime okazas ĉe tre bonaj satiristoj.

Kvankam Beraru dediĉis tiom da siaj horoj al Esperanto li tute ne estis nekonscia pri la malfacilaĵoj de la lingvo kaj de iuj mankoj ĉe kelkaj proponantoj de la lingvo. En “Propagando” li mok-

etas kelkajn esperantistajn faradojn kaj troigojn. Pri la eterna komencanto li rimarkas:

Sed babilo ĉiam sama,
Kun demandoj pri la farto,
Min kredigis ke de l’ lingvo
Tio estas tuta parto....

Kaj pri la malfacileco de la akuzativa finaĵo li skribas:

Por plengusta kaj turmenta
Uzo de l’ akuzativo,
Ho! – laŭŝajne – ne sufiĉas
Eĉ la daŭr’ de tuta vivo.

Li priskribas la situacion de novulo inter babilemaj esperantistoj:

Diskutas ĉiu pri aferoj
Diversaj, sed sen... interes’;
Alparolate, novvarbito,
Respondas senkomprene: jes.

Je la fino de multaj el liaj poemoj kuŝas trafa satira ekideo kiu plenvakas kaj ridigas aŭ almenaŭ ridetigas la leganton. Tiaj troviĝas ekzemple en “Klasikaj studoj” pri Leda kaj la cigno kaj “Pasanta amo” pri la sago de Cupido kaj “Tra Esperantujo... *Apoteoza soneto*” pri iu imagita lando.

Fizike la libro estas bone farita kaj facile legebla.

Tiu negranda libro donos al la amantoj de bone verkitaj satiraj versoj multe da plezuro. Tiaj legantoj estos dankemaj al Ionel Oneț de Eldonejo Bero pro la re-prezentado de tiuj poemoj verkitaj de lia eks-samlandano.

Sylvan ZAFT (Farmington MI)

Bonvolu memori ke ĉiuj mendoj senditaj al ELNA devas esti antaŭpagitaj. Por ĉiuj mendoj de varoj necesas pagi ankaŭ sendokostojn. Nur varoj senditaj al kalforniaj adresoj estas imposteblaj, dum la servoj tute ne estas imposteblaj, sendepende de la klienta adreso. Por pliaj informoj, bonvolu rigardi la ĉi-jaran Libro-katalogon de ELNA.

ESPERANTO IN THE MEDIA

“Retired teacher Art Fonseca, a Boyes Hot Springs resident, communicates with friends around the globe thanks to Esperanto, the universal language, which is spoken by some 2 million people worldwide”, reads the caption under a large photograph of Art, which accompanies an article about him and Esperanto published in *The Sonoma Index-Tribune* of Sonoma Valley CA, on Feb. 9, 1999.

“Esperanto is the most successful of attempts to create an artificial international language” states Barry Krause in *Global Stamp News* (Mar. 1999), in an article about *An Italian Esperanto Postcard and a Hong Kong Wrapper*.

“East Bay Literary Life”, a supplement of *San Francisco Chronicle* published on March 28, 1999 a list of 31 independent book stores in East Bay among which was listed the “Esperanto Bookservice”. In the June 13, 1999 supplement, the Esperanto Bookservice was listed again.

Maria Murphy (Englewood FL) was featured in a local paper dated April 10, 1999 promoting Esperanto. Maria is teaching an Esperanto class at the Southeast Unitarian Universalist Summer Institute.

On April 16, 1999 the composer Lou Harrison was being interviewed on KPFA-FM radio. The conversation turned to his work *Pacifika Rondo* which the announcer pronounced as “pacifika”, likely influenced by the fact that KPFA is part of the Pacifica network. Harrison corrected her saying, “No. That’s an Esperanto word: it’s pronounced pacifika”. She repeated the E-word, saying “Oh, right. Esperanto! Paci-FI-ka.” Unfortunately, they didn’t say anything more about singing in Esperanto, using the language to internationalize titles, etc. but at least the listeners heard the name “Esperanto” twice. Also in the program notes for a concert of Harrison’s works which was given that same evening, the following line appeared: “He has built his own musical instruments, worked as a dan-

cer and dance critic, painted, written poetry, studied calligraphy, signing, and Esperanto.” (Miko SLOPER)

Lisa Lewenz’s award-winning film *A Letter without Words* has been showing recently on PBS stations. The film is about her German-Jewish family and its attempts at assimilation into mainstream Christian society. A voice-over says that the grandmother “Ella taught Esperanto, a language designed to promote world peace.” KQED-FM radio station mentioned Esperanto in a feature piece commenting on the film. (Miko SLOPER)

On April 21, Comedy Central’s “news” program “The Daily Show” featured a brief segment called “Bad Language” about the reissue of the film *Incubus*. While it made a lot of fun of William Shatner, as well as some of Esperanto and the film, there’s an old Hollywood saying that “there’s no such thing as bad publicity.” A few real Esperantists, including AATE president Dorothy Holland, were shown criticizing (in Esperanto) Shatner’s pronunciation in the film. Shatner joked that he was afraid of being typecast in Esperanto-speaking roles, and he replied to a question about T.J. Hooker by saying in Esperanto, “Mi deziras, ke vi amu min,” for the benefit of any Esperantists watching. The reporter for the segment, Mo Rocca, recently took an Esperanto course in New York taught by Tom Eccardt. (Gary GRADY, Durham NC)

Complaining against articles about “fictitious languages” published in *Multilingual Computing & Technology*, Harold Somers (UK) mentions Esperanto among the “so-called languages” (*Multilingual Computing & Technology*, Vol 10, Issue 3, p. 9): “In only one paragraph was it made clear that these are artificial languages, and there was no admission that Klingon and D’nai are entirely useless compared even to, heaven help us, Esperanto, which at least has some realistic claims to being a potentially useful worldwide auxiliary language.”

“In my travels around the world for business, I have found almost no one

who could speak Esperanto. In many cases, people didn’t even know the language existed. In all business meetings in which participants came from a number of countries, English was spoken. Not once have I encountered the use of Esperanto.” (Claudio STENBERGER, Cincinnati OH in *The Rotarian*, May 1999, p. 13)

We wish more journalists took Esperanto as seriously as Mark Feeney did in the *Boston Globe* (May 12, 1999) who is surprised that “2 million speakers worldwide get their words’ worth from the ‘planned language’ created in the 19th century.”

Things seem to be different for Stephen Beaupre from the *Worcester Magazine*, who concludes that “... like most plans hatched by lonely guys without social lives, the good doctor’s utopian dream turned out to be a dud.” We can only congratulate Steve for his deep knowledge of Zamenhof’s social life.

A full-page, full-color Esperanto ad appeared in the July-August 1999 edition of the travel journal *Trips*.

The German hiphop group Freundeskreis just released an album called *Esperanto*, with a subtitle *Amikaro* (the Esperanto translation of the band’s name). Although mostly in German, some fragments of Esperanto text are woven in. A band member said “It’s about hiphop as a language of international youth. Esperanto is a language evolved out of many different European languages. For mi hiphop functions just like that.”

ALVOKO

Tiuj, kiuj aperigis siajn e-poŝtajn adresojn en la adresaro por retanoj (vidu *Esperanto USA* 4/1998 p.10) estas petataj rigardi ĝin kaj fari la necesajn ĝustigojn. Nece-
sas ke ankaŭ la gravuloj de ELNA kaj de la E-kluboj indiku al la kompilanto la eventualajn ŝanĝojn. Tiuj, kiuj ankoraŭ ne konas la adresaron, petu ĝiajn adresojn de la CO.

MENCIINDE

Se vi maltrafis la unuajn du Internaciajn Himalajajn Renkontiĝojn kaj ŝatus viziti Nepalon en E-a etoso, petu informojn pri la 3a Internacia Himalaja Renkontiĝo okazonta venontjare. Informojn havigas: Nepala Esperanto-Asocio, PO Box 10518, Kathmandu, Nepalo.

Esperantistoj konas Richard Henry Geoghegan kiel la unua denaske angleparolanta esperantisto. Sed ili ekscios multon pri la vivo de tiu fascina pioniro el ĉapitro de la nova libro *Good Time Girls of the Alaska Yukon Gold Rush* de Lael Morgan (Epicenter Press, 1998). La informoj por tiu ĉapitro devenis de ankoraŭ nepublikigita biografio de Geoghegan, verkita de David Richardson. (Maya KENNEDY, Pacifica CA)

Esperanta Kalendaro 2000 is now available. This is much more than a mere calendar: it is a teaching tool! Each day shows a new rootword taken from the list of most-used words. Not only good for beginners: passers-by can take a look and become fascinated. There is also a copy of the sixteen rules of the *Fundamento* to help explain the elegantly simple structure of our dear language. Available for just \$4.75 from the ELNA Bookservice. No discounts! Regular S&H and sales taxes apply.

Congratulations to Jennifer Korp (Chesterfield MO), who graduated in June from Principia College (Elsah IL) with a major in Esperanto. This is (to the best of our knowledge) the first such college degree in U.S. history! Her sponsor and advisor was Duncan Charters, long-time Esperanto teacher, and former president of ILEI.

Gratulojn al Ralph A. Lewin (La Jolla CA), kies libro *Merde ĵus aperis ĉe Random House*. La titolo diras ĉion pri la enhavo de tiu ĉi libro, en kiu la aŭtoro ja mencias Esperanton (p.4).

Gratulojn al Dorothy Holland (Santa Barbara CA), kiu reedziniĝis la 7an de julio.

Gratulojn al David Pardue (Lawrence KS), kiu patriĝis la 24an de junio.

Adiaŭon al Salomon Helfgot (New York NY) kaj al Leslie Share (Bloomfield MI), forpasintaj en junio ĉi-jare.

It has already been reported in a local club bulletin (*La Semanto*, July-August 1999), that the site of the next year's ELNA Congress will be Atlanta, GA. This is news to the staff of the Central Office! We have not yet heard of any official decision taken by the Estraro with regard to the next year's convention.

Please notice that next year's Universala Kongreso will take place earlier than usual, and that the beginning and ending days will be Tuesdays, instead of the traditional Saturday, which is widely observed in Israel as a Sabbath. The actual dates are July 25th through August 1st, and the officially approved and announced location is Tel Aviv, Israel.

REAGE

Mi volas reagi al via havaj-kolektiva recenzo de *Ludu kun ni*, la lernilo por etuloj verkita de Elisabetta Vilisics Formaggio (*Esperanto USA* 3/99, p.8). Viaj recenzantoj elstarigis bazan mankon (eble la solan, krom la altan prezon, kiu obstaklas ĝian uzon kiel klasan lernolibron), nome ke ĝi enkondukas la akuzativon nur ekde la 44a paĝo. Mi diagnozus tion nur parto de pli vasta problemo – la manko de verbo-centreco. Ja ĝis tiu paĝo mankas ne nur akuzativo, sed ajna verbo krom 'esti'. Tra la unuaj cent paĝoj ĝi sukcesas ekzisti per nur manpleno da verboj, sen fizike demonstreblaj transitivaj verboj kiel tuŝi, preni, levi, montri, puŝi, tiri... La utiligan imperativon oni renkontas nur ekde p. 112. En Esperanto ĝusta konigo de la (ne-)transitiveco de la verboj estas kerna demando (kun implicoj ĉefe sed ne nur al la ĝusta uzo de la akuzativo). Do, abundaj verboj en konvenaj kunteksto endas jam de la komenco de la studado.

Aliflanke, dum la recenzo komentis serion da konstatoj pri specifaj enhavo de unuopaj paĝoj (valoraj por instruantoj), ĝi tute maltrafis la unikan virton kaj meriton de la libro. Senprecedence, ĝi dispecigis la ŝtupojn de nia didaktika gramatiko, specife en kunteksto por junaj lernantoj. Neniu ĝis nun tiom zorge kaj konkrete faris tion, ofte metante ilin en amuzan, atentokaptan desegnititan situacion. Efektive, ĝi sekvas proksime la temŝtuparon de Cseh, sed plifajngigas ĝin kaj adaptas ĝin al la celata aĝ-grupo. En 1994 mi kuraĝis profeti ĝin mejloŝtona verko; kvin jarojn poste mi ne revizius tiun opinion (krom se endas ke ĝi ekestu kilometro-ŝtona). Ĝi servos kiel valora modelo por lernil-verkantoj dum multaj jaroj. Espereble ĝi inspiros iujn el ili uzi la allogajn prezento-manieron kaj ekzerco-formojn, sed kun verboj centre sur la podio.

Stefan MacGILL (Budapest HU)

NOVA TELEVID-SERIA KURSO

por instrui Esperanton

Vojaĝa

al Saint Louis por la ELNA-kongreso
al Varsovio por la antaŭ-UK-a vizito
al Berlino por la 84a UK de Esperanto
al Karlovy Vary por la ILEI-konferenco
al Rumanio kaj Hungario por la post-UK-a ekskurso
al Veszprém por la 55a IJK

Lessons 1 through 8 available
during the conventions.

Esperanto – Pasporto al la tuta mondo will eventually include at least 15 full-color lessons, using the direct method to be useful everywhere in the world.



La familio Bonvolo kaj amikoj invitas vin plani akompani ilin al Tel-Avivo por la venontjara UK, kaj se eble kontribui pli da mono por fini la projekton!

This new Esperanto video course, written by Paul Gubbins, is part of the UEA's *Kampanjo 2000*, which includes the creation of modern teaching methods. Convention participants will be pleased to see that this audacious project is progressing almost on schedule. With eight lessons already filmed and edited, and lessons 9 through 12 already filmed, we are well on the way to providing a compellingly interesting video (and eventually CD-ROM) learning tool for the 21st Century. We would have been completely on schedule (with 15 lessons filmed and edited) had we not been short of money. It is coming, but it hasn't come in time to finish the project before the start of the new century. But we are certain that *venkos ni en gloro*.

The author, Dr. Gubbins, encourages all to become familiar with the drama. Although its aim is to teach Esperanto, it will also amuse experienced Esperantists. The story is set in *Esperantio* and only the experienced Esperantists will catch the multiple meanings. The beginners will enjoy, but the *spertuloj* will laugh out loud at the puns and references to our culture.



In photo above: (top row) Leonora Torres (Filisa Bonvolo), Miko Sloper (Georgo Bonvolo), Katsunori Syozi (Ken), Vesna Heyman (Flora Bunda); (middle row) Stefan Boddington (Karlo Bonvolo), Guy Menahem (Ruselo); (front row) Mingchi Chien (Jolanda Bonvolo), Jennifer Korp (Helena Bonvolo). Not pictured: Steve Wagenseller (Detektivo), Amalie Johansen (Kuracisto), Natsuko Aoyama (Nina), Paul Gubbins (Flughavena funkciulo), John Wells (Prof. John Wells).

Page realized by Lusi Harmon
Esperanto-Vojaĝservo
6104 LaSalle Av
Oakland CA 94611
☎ 510/339-2001
☎ 510/339-6317
✉ lusiharmon@aol.com

**KOTIZOJ POR
ESPERANTO-LIGO POR NORDA AMERIKO
(ELNA)**

Individua membro	\$30.00
Juna membro (maksimume 27-jara)	\$15.00
Membro kun limigita enspezo	\$15.00
Familia membreco	\$45.00
Subtena membro	\$60.00
Patrona membro	\$90.00
Dumviva membro	\$600.00

Membroj de ELNA, sendepende de la kategorio, ricevas ĉiujare la jenajn: *Esperanto USA* (6 numeroj); *ELNA Update* (4 numeroj); Membro-listo + suplemento (po 1); Librokatalogo (1).

Amiko de Esperanto (nemembro) \$10.00

Amikoj de Esperanto ricevas ĉiujare la jenajn: *ELNA Update* (4 numeroj); Librokatalogo (1).

**KOTIZOJ POR
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
(UEA)**

Membro kun <i>Gvidlibro</i>	\$10.00
(ricevas la <i>Gvidlibron tra la Esperanto-movado</i>)	
Membro kun <i>Jarlibro</i>	\$24.00
(ricevas la <i>Jarlibron de UEA</i>)	
Membro-abonanto	\$60.00
(ricevas la <i>Jarlibron de UEA</i> kaj la revuon <i>Esperanto</i> - 11 numerojn jare)	
Dumviva membro	\$1500.00
(ricevas dumvive la samon kiel Membro-abonantoj)	
Membroj en la kategorioj: Membro kun <i>Jarlibro</i> , Membro-abonanto kaj Dumviva membro ricevas ankaŭ la revuon <i>Kontakto</i> , se ili estas 30-jaraj aŭ pli junaj.	
Societo Zamenhof	\$120.00
Patrono de TEJO	\$72.00
(ricevas la revuon <i>Kontakto</i> - 6 numerojn jare kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO)	

Ĉiuj membrecoj estas por la kalendara jaro; la menciitaj kotizoj validas por 1999.

Oni povas pagi por UEA-membrecoj pere de ELNA (vidu la adreson ĉi-sube), sed ĉiuj UEA-materialoj sendiĝos rekte el Nederlando. Tiuj, kiuj volas membriĝi en UEA rekte, povas fari tion kontaktante la Universalan Esperanto-Asocion ĉe: U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Por ricevi aliĝilon por ELNA kaj UEA, kun kompleta listo de E-periodaĵoj aboneblaj pere de ELNA, bonvolu sendi adresitan kaj afrankitan koverton al la adreso de ELNA.

Esperanto League for North America
PO Box 1129
El Cerrito CA 94530

Non-Profit Org US POSTAGE PAID Permit #1040 Leesburg, FL 34748
